# Fervoja mondo 2010/09

*(mesaĝo de Jindřich Tomíšek, 2010-nov-20)*

## El fervoja mondo 9/2010

**Finnlando - Italio - Usono - Ĉinio - Germanio - Ĉeĥio - Svislando - Slovakio**

**Finnlando : aperis nova komerca entrepreno -** Nova komerca entrepreno, fondita de finna transport-entreprenisto VR kaj rusa entrepreno *Freight One Company PCK* (filia kompanio RĴD) nomiĝas *Freight One Scandinavia*. Al siaj klientoj ĝi proponas eksportan, importan kaj transitan trafikojn inter Finnlando kaj Rusio en unuoopaj vagonoj kaj ĝiscelaj bloktrajnoj. Estro de logistiko de la konzerno VR *Erik Soederholm* citis : „Per propono de pliaj transportoj al Finnlando aŭ tra Finnlando al Rusio ni realigas dezirojn de niaj klientoj."

**Italio : komencis konstruadon de grava tunelo -** En januaro 2010 komenciĝis laboroj por konstrui novan tunelon kun nomo *Terzo Valico*, kio estas tunelo por grandrapida fervoja linio inter *Genova* kaj Milano. Kiel anoncis ministro por ekonomio *Claudio Seajola*, la itala registaro disponigis por la unua etapo de konstruado monsumon atingantan 500 milionojn da eŭroj. La konstruata kunligo havas plej altan prioritaton por la lando, ĉar ĝi ebligos krei el *Genova* unu el la plej gravaj centroj de internacia interŝanĝo de varoj inter Eŭropo kaj Azio.

**Usono : *Buffett* prunteprenas por fervojo -** *Warren Buffett*, legenda investisto el Usono, garantias bezonatan pruntmonon por sia ĝis nun la plej granda investaĵo, kiu estas aĉeto de fervoja kompanio *Burlington Northern Santa Fe* (BNSF), por kiu li volas pruntepreni en la kapitala merkato proksimume ok miliardojn da usonaj dolaroj. Kiel kontraŭvaloron oni proponas ŝuldatestojn de la holdingo *Berkshire Hathaway*. Nun apartenas al *Buffett* jam pli ol dudek procentoj da akcioj de la konzerno BNSF, kiu viciĝas

al la plej grandaj fervojaj vartransportistoj en Usono.

**Ĉinio : en Ĉinio oni malfermis fervojan linion por rapido 380 km/h -** Fine de decembro 2009 oni komencis komercan ekspluatadon sur la ĉina grandrapida fervoja linio Vuhano (*Wu-chan*) – Kantono (*Kuang-ĉou*). La unua trajno kun pasaĝeroj inter la ĉefurboj de la provincoj *Chu-pej* kaj *Kuang-tung* registris veturdaŭron 2 horoj kaj 48 minutoj, kun meza rapido 329,3 km/h. Notindas, ke veturdaŭro de trajnkunligo sur la 1068 km longa malnova linio estis 10 horoj kaj 30 minutoj. Tiu ĉi grandrapida fervoja linio estis kiel la dua enlande proponita por ekspluat-rapido 350 km/h, la trajnoj tamen sur ĝi veturas ĝis 380 km/h. Dum provadoj de funkciado antaŭ komenci regulan trafikadon, precize la 9-an de decembro 2009, oni registris la maksimuman rapidon 394,2 km/h. La ekspluatadon prizorgas motorvagonkombinaĵoj de la firmaoj *Kawasaki* kaj *Siemens*, kiuj en kazo de bezono veturas kuplitaj kun plia kombinaĵo. Oni atendas, ke la linio 968 km longa dumtempe restos la plej longa grandrapida fervojlinio en Ĉinio, ĝis kiam ne estos finkonstruita fervoja linio por pasaĝertrafiko Pekino – Ŝanhajo, longa 1318 km.

**Usono : fervojajn projektojn oni dotos per 8 milardoj da dolaroj -** Usona prezidento *Barack Obama* anoncis dum sia januara vizito en 2010 en Florido unuopajn fervojajn projektojn, por kiuj oni donos monsumon 8 miliardoj da dolaroj, ĉerpitaj el federaciaj fondusoj. La ŝtatoj kaj civitoj povis pretendi la monon en konkurso, anoncita en aprilo 2009 kiel parton de ekonomia pakaĵo por renovigo kaj reinvestoj en sumo 787 miliardoj da dolaroj. Granda parto de la mono estis disponigita al vastaj projektoj, kiuj estas grandrapidaj fervojoj en Kalifornio kaj en Florido : 1,25 miliardoj da dolaroj estas destinitaj por konstruado de la proponata fervojlinio *Tampa – Orlando* por rapido 270 km/h, monsumo 2,25 miliardoj da dolaroj apartenos al kalifornia projekto de kunligo *Los Angeles – San Francisco* por rapido 350 km/h. „Ni kunligas la urbojn, kiuj estas tre proksimaj por efika aertrafiko, sed grandrapidaj ŝoseoj inter ili estas preskaŭ superŝarĝataj super sia kapacito", proklamis en sia klarigprezento *Ray LaHood*, la usona ministro de trafiko.

**Germanio : Stutgarto ricevos novan stacion kaj pli rapidan kunligon -** Federacia ministro de trafiko *Peter Ramsauer* kaj ĝenerala direktoro de Germanaj Fervojoj (DB) *Rüdiger Grube* la 2-an de februaro 2010 partoprenis solenan komencon de laboroj laŭ vasta projekto *Stuttgart 21*. Kune kun aliaj gastoj oni solene forigis trakfinan baraĵon en la ekzistanta fervoja stacio, por tiele montri komencon de realigo de la ambicia plano, per kiu oni anstataŭigos la nunan ĉefan stacion. La nova stutgarta subtera stacio fariĝos komenco ankaŭ de la dua, ne malpli grava parto de la projekto – grandrapida linio 84 km longa kaj gvidanta ĝis *Ulm*. Ĝi estos konstruata laŭlonge de la grandrapida ŝoseo A8 kaj mallongigos veturdaŭron inter ambaŭ urboj al nur 28 minutoj. Ĉefa elemento de tiu ĉi projekto estas tunelo *Filder* 9,5 km longa, kiu direktiĝos suden de la ĉefa stacio al nova stacio, kiu trajntrafike priservos

la flughavenon en Stutgarto kaj areon de la komercaj grandfoiroj. La veturtempo el la centro al la flughaveno reduktiĝos de ĝisnunaj 27 al 8 minutoj.

**Ĉeĥio : *ČD Cargo* ĉe naskiĝo de alianco *Xrail* -** Sep ĉefaj eŭropaj operatoroj de fervoja vartrafiko kreis la 18-an de februaro 2010 en svisa Zuriko aliancon por trafikado de vagonkargaj ekspedoj *Xrail*. Ekspedoj vagonkargaj prezentas en Eŭropo proksimume duonon de ĉiuj transportoj de varoj sur fervojo, kaj laŭ studoj de la merkato havas konsiderindan internacian kreskan potencialon. Tiu ĉi plej grava trafikmaniero tiel nun fariĝas multe pli alloga kaj efika. Tio estas ankaŭ ĉefa celo de la alianco *Xrail*, kiu strebas grave altigi konkurenckapablon en trafiko de fervojaj vagonkaergaj ekspedoj en Eŭropo, per kiu ĝi helpos malpezigi trafikon sur ŝoseoj kaj helpos tiele al protektado de vivmedio. La projekto *Xrail* komenciĝis en 2007 sub gvido de *UIC* en Parizo. Nun en ĝi membras sep partneroj kun aktivado en 11 landoj : *ČD Cargo* (Ĉeĥio), *CFL Cargo* (Luksemburgio), *DB Schenker Rail* (Germanio, Nederlando, Danio), *Green Cargo* (Svedio, Norvegio), *Rail Cargo Austria* (Aŭstrio, Hungario), *SBB Cargo* (Svislando) kaj *SNCB Logistics* (Belgio). Simboloj de la projekto *Xrail* alportas avantaĝojn al la klientoj dum trafiko trans limojn en tri sferoj : fidindecon (minimume 90 procentojn en internacia trafiko de ekspedoj vagonkargaj sur la reto *Xrail*), travideblecon (internacia horaro el klienta trako de ekspedinto al klienta trako de adresato kaj uzadon de aktivaj informsistemoj) kaj procedon de oferto priservada (tempo de prilaboro maksimume tri tagoj). *Xrail* profituzas la ekzistantan infrastrukturon , koridorojn *TEN-T* kaj elektitajn konteneranjn transkargejojn kaj klientajn trakojn. „Ĉe vagonkargaj ekspedoj ni ĉiam pli estas prempuŝataj per konkurenco de la surŝoseaj transportistoj", aludis komerca direktoro de *ČD Cargo Rodan Šemekl*, kiu nome de tiu ĉi kompanio subskribis la fondkontrakton. „La alianco *Xrail* bezonas proponi pli grandan fidindecon, rapidecon, eblan lokrezervadon kaj dumveturan observadon de transportata sendaĵo fare de kliento per interreto."

**Svislando : dua fervoja ponto por Bazelo -** En duono de decembro 2009 en Bazelo oni komencis konstrulaborojn por la dua fervoja ponto trans riveron Rejno, kiu estos 240 metrojn longa. Konstruado de la linio inter la bazelaj stacioj *SBB* kaj la stacio *Basel Badisher Bahnhof*, inkluzive de plivastigo de du al kvar trakoj, estu finita en la jaro 2017, do en tempo de malfermo de *Gotthard*-baza tunelo. Dank´ al la nova ponto eblos plialtigi nombron de translimaj trajnoj *S-Bahn* al Germanio de 80 al 140.

**Slovakio : sur la koridoroj pli rapide -** En Slovakio nuntempe troviĝas proksimume naŭdek km de la modernigitaj fervojaj koridoraj liniopartoj sur la linio *Bratislava-Rača*,- *Nové Město nad Váhom*. Procedo de modernigo tamen estas daŭrigata. En la plej proksima tempo estos pretigitaj por pli grandaj rapidoj pluaj liniopartoj *Nové Město nad Váhom – Púchov – Žilina – Liptovský*

*Mikuláš – Košice*. Estas daŭrigataj ankaŭ laboroj por modernigi linioparton *Žilina – Čadca – Skalité* – landlimo Slovakio/Pollando, sur la 6-a transitkoridoro.

*(Kompilis Jindřich Tomíšek)*

*(Reviziis Heinz Hoffmann)*